

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

Oomoto

n-ro 456
2009
jan.-dec.



ISSN 0388-0672

La granda sankta laboro fari bazon por celi al la mondo Miroku

Spirita Gvidantino de Oomoto, DEGUĈI Kurenai

En 1892, la 25a jaro de Meĵi, la jaro Mizunoe'no'Tacu*), Oomoto estis fondita de la Fondintino DEGUĈI Nao, ekposedita de Dio, kaj en 2012, la 24a jaro de Hejsej, cirkule revenos la tria Mizunoe'no'Tacu, la plej grava nota jaro.

Nuntempe, Oomoto troviĝas en la periodo transira al la sankta mondo, kian oni neniam povos renkonti escepte de ĉi tiu ŝanco: kun la senmanka Dia aranĝado dum senlime multaj jaroj ekde la antikva Dia epoko, la idealo de la vera Dio, kreinta la ĉielon kaj la teron, finfine proksimiĝas al la tempo, kiam ĝi kompletiĝos kaj manifestiĝos en la mondo.

Kiam ni konsideras ke la historio de la viv-evoluo estas tiom longa, kiom 4.6 miliardoj da jaroj, multe superanta la imagon de homaro, kaj ke ni naskiĝis en tiu ĉi 21a jarcento, ni ekscias ke antaŭ ĉio plej grave estas profunde kompreni niajn noblajn mision kaj respondecon servi por la lasta sankta laboro, t.e. realigi la mondon Miroku, kio ĝis nun ne okazis kaj nek okazos estonte.

La konstruo de la sankta tereno havas grandan signifon kaj kiam ni nin turnas al la historio de la konstruado de la temploj, plenumita de la sinsekvaj gefondintoj kaj gegvidantoj, ni povas

klare vidi tre progresantan figuron de la sankta laboro de Oomoto.

Danke al la konstruo de la temploj Miroku-den kaj Banŝo-den, ja forviŝiĝis la malbona impreso pro la Dua Oomoto-Afero, t.e. la koncepto "suspektinda religio", kiu daŭris dum longa tempo, kaj la religia mondo komencis akcepti Oomoton kun konfido kaj atento.

Kaj, pro la konstruiĝo de la templo Ĉoosej-den Dia lumo komencis brili plivaste sur la tero kaj la ekzisto de Oomoto montriĝis pliforte en la mondo.

Kiam la konstru'
de l' templo Ĉoosej-den
venos al la fin',
finfine realiĝos
sankta Dia entrepren'.

Kiel utaas Sankta Majstro, plenumi la mision por la savo de la homaro kaj ĉiu vivaĵo kaj celi al la realiĝo de la Dia plano en la tergloba epoko, kiam ŝanĝiĝas la mondo, devas esti tasko, al ni donita de Dio, kiel la memora entrepreno por la 120-jara jubileo de la fondiĝo, mi pensas.

La grandaj celoj por la memora entrepreno



Nova Oomoto-Domo kaj aŭditorio por prelego en Kameoka

de la 120-jara jubileo de la fondiĝo estas jenaj: unue la konstruado de la sankta tereno laŭ Dia volo, due la bontenado de doktrinaj kaj instruaj libroj kaj la solidigo de la organiza bazo, eterne neŝancebla, ekzemple, edukado de talentuloj k.a., trie la konstruado de la sanktaj terenoj, en kiuj ĉiuj kredantoj povos senti la trankvilecon kaj ĝojon de dikredo. Ĉi tiujn ĉiujn mi volas fari kolonoj.

Kiel Diaj Revelacioj esprimas, "Oomoto por la mondo – la loĝejo de la veraj Dioj", de nun ĉiuj homoj enlandaj kaj eksterlandaj, kiuj vizitos la sanktan terenon, tuŝos Dian lumon kaj elkore ĝojos pro la bela spirita brilo; mi deziras ke Oomoto estu tia sankta tereno de la mondo.

La fonto Tamasui disvastiĝas tra la mondo, ekirinte de la lago Kinrjukai, kiel la pura favor-akvo de Dio, kiu instigas homaron bonŝanĝi la koron, tiel same ni, loĝantaj en ĉi tiu loko, devas iĝi loĝantoj de la ĉielula regno, montrante bonajn ekzemplojn, kaj "konstrui la templon Ĉoosej-den en nia koro", t.e. naski laŭeble multajn verajn homojn, kies aperon ekde la fondiĝo Fondintino deziradis kaj atendadis. Ĝuste ĉi tio estas la plej grava punkto por la sankta laboro, t.e. por la memora entrepreno de la 120-jara jubileo de la fondiĝo, mi kredas.

En tiu ĉi favorplena Secubuna Festo, mi elkore deziras al vi ĉiuj la specialajn klopodon kaj helpon por la granda sankta projekto kiu fariĝos la ponto al la mondo Miroku.



*) Mizunoe`no`Tacu (akvodrako): nomo de jaro kiu cirkule venas en ĉiu 60a jaro laŭ la japana kalendara sistemo, deveninta de Ĉinio en la jaro 600 p.K.

Nova oficejo en Kameoka



Memora Entrepreno por la 120-jara Jubileo de la Fondiĝo de Oomoto


Oomoto celebros la 120-jaran jubileon de la fondiĝo en la jaro 2012, kaj por jubilei tion Oomoto nun entreprenas konstrui novajn preĝejon kaj oficejojn.

La Spirita Gvidantino anoncis pri la entrepreno en sia saluto de la Secubuna Granda Festo en 2006, post tiam Oomoto komencis serion da konstruo.

Ĉi tie ni raportas pri la entreprenoj: konstruo de la nova Tokia Centro kompleta en aprilo 2008; en Ajabe, instalado de la nova preĝejo Banrei-ŝa (templo por ĉiuj animoj kaj spiritoj) ene de la sanktejo Miroku-den plenumita en majo 2008; en Kameoka, la konstruo de la nova aŭditorio por prelego elfarota antaŭ 2012, kaj la konstruo de la nova Oomoto-Domo – oficejo, kunvenejo, akceptejo, gastejo, halo

kaj manĝejo – kompleta en aŭtuno 2010.

La instalado de la nova preĝejo Banrei-ŝa havas aparte gravan signifon. La Dua Spirita Gvidantino Deguĉi Sumiko konstruis la preĝejon Banrei-ŝa en 1950 por savi animojn kiuj suferas en la spirita mondo, kaj la animojn tra la mondo sen funebrantoj. Poste oni ankaŭ elvokis la animojn de la viktimoj de kataklismoj, militoj, malsatoj, epidemioj, mortopunoj kaj sinmortigoj. Tiu ĉi preĝejo celas la grandan savon de la spirita mondo. Ni pensas ke tiu ĉi templo estas unika kaj senekzempla en la mondo. Kiel la parto de la entrepreno, la Kvina Spirita Gvidantino Deguĉi Kurenai konstruis la novan templon kaj tien translokigis la altaron de Banrei-ŝa en majo 2008.



Konstruo de la nova Tokia Centro






Instalo de la Preĝejo Banrei-sa

Konstruo de la nova Oomoto-Domo





Konstruo de la nova Oomoto-Domo



Utafesto en Brazilo en du urboj: Sao-Paŭlo kaj Brazilio

La 50a datreveno de la fondiĝo de Brazilio

En 2010, venontjare en Brazilo okazos Oomoto-Utamacuri (Utafesto de Oomoto) en du lokoj: la 9an de okt. en Sud-Amerika Centro de Oomoto en Jandira, Sao Paŭlo, kaj la 13an de okt. en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo.

La jaro 2010 estos tre signifoplena kaj memorinda por Brazilo, ĉar en la jaro la ĉefurbo Brazilio atingos la 50an datrevenon ekde sia fondiĝo.

En 1956, Juscelino Kubitschek, la 22a prezidento de Brazilo, komencis konstrui ĉefurbon por realigi sian publikan promeson ĉe la elekto. Kaj en tute primitiva savano de la centra kontinento de Brazilo li aperigis tre elegantan modernan urbon post tri-jara konstruado. Kaj en 1960, de Rio de Janeiro li translokis la ĉefurban funkcion de Brazilo. Kaj en 1987, pro la bone polurita eleganta aspekto de la urbo kaj pro la arkitektura beleco de la konstruaĵoj la ĉefurbo Brazilio estis registrita kiel mondoheredaĵo de Unesko.

Do, venontjare, tra la tuta jaro okazos diversaj eventoj, registaraj kaj civitanaj, por gratuli la 50-jaran jubileon de la ĉefurbo. Utafesto okazos en tia memorinda jaro de Brazilo.

Mistero de Brazilio

Brazilio estas mistera urbo, kies apero estis antaŭdirita de Sankta Johano Bosco (1815~1888)

Direktoro de Oomoto Internacia, MAEDA Shigeki

en Italio jam en la 19a jarcento, tiel ke en la centro de la Sud-Amerika kontinento aperos la nova sankta urbo de la mondo kune kun granda lago. Ankoraŭ pli mirinda estas tio: kiam montriĝis la nove konstruita urbo, oni surpriziĝis pro la fakto ke la urbon regis egipta etoso kaj tie kaj tie troviĝis piramidstilaj konstruaĵoj. Pro tio, ne malmultaj estas tiuj civitanoj (en Brazilio), kiuj kredas ke Juscelino Kubitschek povas esti reenkarneigo de Akhenaten (Amenhotep la 4a, Faraono de la 18a dinastio en la antikva Egiptio). En la jaro 1378 a.K. Akhenaten konstruis la novan ĉefurbon de Egiptio "Akhetaten (Amarna)", 360 kilometrojn malsupre de Thèbes (tiam ĉefurbo) apud la rivero Nile, kaj sukcesis la translokadon de la metropolo.

Templo de Bona Volo

El ĉiuj temploj kaj instalaĵoj en Brazilio la plej egipteska estas Templo de Bona Volo. Ĉi tiu templo estas pure piramidforma kaj ene de la templo troviĝas pompa egipta ĉambro kaj estas ekspoziciataj multaj valoraj objektoj de la egipta kulturo. Ĉi tie estas ekspoziciataj ankaŭ objektoj de Oomoto, ekzemple, la foto de la templo Ĉoosejden, la verko (ceramikaĵo) de la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto k.a. Jen estas la loko kie okazos la venontjara Utafesto.

Tiu ĉi piramida monumento, la templo de Bona Volo, estis konstruita de LBV (Legio de Bona Volo, la plej granda Neregistara Organizo en Brazilo) antaŭ 20 jaroj kun



ekumenisma koncepto. LBV akceptas ĉiujn religiojn sendiskriminacie kaj klopodas organizi interreligiajn eventojn, ekzemple, regule okazas komuna preĝo por la paco.

Utafesto traktos la vojon por la futuro de homaro

Amenhotep la 4a konstruis la novan urbon kaj de Thèbes translokis la ĉefurban funkcion por trankviligi kaj pacigi la mondon, kiu troviĝis siatempe en granda konfuzo pro la religia konflikto. Kaj li bone regis la mondon dum kelkaj jaroj ĝis la dinastio de Tutankhamun kaj la koncepto monoteismo naskiĝis en tiu ĉi periodo. Kaj kiam Juselino Kubitschek vizitis Egipton antaŭ ol konstrui Braziljon (Brazilio), li ricevis de la egiptaj civilizacio kaj pejzaĝo tre fortan impreson kaj diris, “Ĝuste ĉi tiu estas civilizacio de homaro”. Kiel menciite, inter Akhetaten (Amarna), Brazilio kaj LBV (Legio de Bona Volo) troviĝas komunaj punktoj: unu estas egipta civilizacio kaj alia estas ekumenismo kiu celas pacan mondon per religia harmonio.

Antaŭ 50 jaroj, kiam finkonstruiĝis la urbo Brazilio, el diversaj regionoj de la kontinento kolektiĝis multaj personoj, kiuj sopiris al la nova nekonata urbo. Inter ili troviĝis multaj religiuloj kaj spiritualistoj, kiuj kredis ke la urbo povas esti la nova sankta tero de la mondo. Translokiĝis ankaŭ multaj esperantistoj kaj komencis la



agadon en la nova kampo, fondante asociojn kaj klubojn. Nun la centra oficejo de BEL (Brazila Esperanto-Ligo) troviĝas en Brazilio.

Brazilio estas futurtipa metropolo, konstruita en la formo de aviadilo, kun la koncepto “de aviadila industrio al kosma ekspluato”. En la metropolo Brazilio abundas diversaj deziroj kaj esperoj al la paco kaj prospero por la futuro de la homaro. La venontjara Utafesto en la nova sankta tero de la mondo certe traktos la vojon al la brila estonteco de la homaro. Ni do partoprenu en la utafesto kaj preĝu al Dio pri la paco de la mondo kaj pri la feliĉo de la homaro.

Programo (resuma)

La 8an de oktobro 2010

2:00 pm. Utafesto en Hakukoŭ-en

La 9an de oktobro 2010

10:00 atm. Granda Festo de Printempo en Hakukoŭ-en

La 13an de oktobro 2010

7:30 pm. Komuna preĝo de religioj

8:00 pm. Utafesto de Brazilio

9:00 pm. Te-festeno

La 14an de oktobro 2010

atm. Eventoj en Parlamento kaj Parla-Mundi

7:30 pm. Gratul-kunveno por la 5a datreveno de Oomoto Internacia

La blua ĉielo kaj la verdkolora stepo brakumos vin en Mongolio!

La 6-a Azia Kongreso de Esperanto elkore invitas laŭeble plej multajn partoprenantojn al Ulanbatoro en Mongolio
<De la 19a ĝis la 23-a de junio en 2010, Ulanbatoro>

Konsiliano de Mongola Centro de UHA, AGOU Takaŝi

Antaŭ 6 jaroj mi unuafoje havis okazon vojaĝi al la urbego Ulanbatoro en Mongolio kaj estis varme bonvenigita de lokaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis s-ro Enkhee CHIMEDTSEREN, nuna prezidanto de Mongola Esperanto-Societo (MES) kaj tiu de LKK por la 6-a Azia Kongreso de Esperanto en 2010.

Kiam mi ĝuis restadon ĉe nomadaj geloj, rajdante sur mongolaj ĉevaloj, tiam la blua ĉielo kaj la verdkolora stepo kvazaŭ min brakumis kiel mia anima hejmloko.

Plie, en noktoj mi estis multe fascinita de neimageble mirinda spektaklo sur la ĉielo kiu estis tute plenigita de nekalkulebla multnombro da steloj grandaj kaj malgrandaj. Tiam, mi reale sentas min, nur se mi povus teni en mi puran koron, eĉ almenaŭ la momenton, mi eblus inerkomunikiĝi kun la koro de la ĉielo sur la longe etendiĝanta stepo.



Nu, kia estis la historio inter Oomoto / UHA kaj Mongolio? Jen estas la mallonga priskribo pri ĝi.

La majstro
D E G U C H I

Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto fondis la organizon "Esperanto-Populariga Asocio (EPA)" en junio, 1923, kaj februare en 1924 li celis vojaĝi al Mongolio, kuraĝe praktikante Dian revelacion: "La fundamento de monada paco realiĝos surbaze de la spirita kaj morala paciĝo en Azio.", "Azio estas ekstreme grava terzono por starigi mondan pacon; neniam oni povus solvi la problemojn de mondaj maltrankviloj, senkonsiderante azion kiel tiun de la fundamento. "

Laŭ lia instruo la pratempa mongolio estis la loko, kie la Dio nomata Susanoo-no-mikoto misie eklaboris por regi la mondon paca. Tial, la majstro DEGUCHI O. projektis starigi la grandan federacion de azio spirite kunigita, inkluzive de Ĉinio, Barato kaj mezoriento, por ke la fundamenta problemo de tutmondaj maltrankviloj estu solvitaj, aparte starigante sian centron en Mongolio.

Fakte, kun Dia reveracio li surtere transiris



la duonan insulon de Koreio kaj tra ĉina kontinento li celis viziti Mongolion. Sed, junie li renkontis la katastrofon en Pajntala (nuna Tonglĵaŭ en la nord-orienta regiono de Ĉinio) post 4 monata senprecedenca aventuro, kaj lia revo fondi religian idealan mondon en Mongolio estis kvazaŭ interrompita.

Tamen, la majstro dum sia vivo ripete akcentis tion ke lia vizito al Mongolio estis granda sukceso, per kio firmiĝis la fundamento de la spirita unueciĝo de la mondo. Kaj sekvantan jaron, 1925, Universala Homama Asocio (UHA), la satelita organizo de Oomoto, estis fondita de li kaj Esperanto estis oficiale lernata kaj praktikata en ĝia internacia agado kiel neŭtrala lingvo internacia por tuta homaro.

Nun, la administra centro de UHA situas en Kameoka, kaj al ĝi apartenas ĉirkaŭ 600 branĉoj sub gvido de 60 konsilioj en Japanio. Eksterlande troviĝas unu centro en Mongolio, la nacia oficejo en Barato kaj la administrejo en Brazilo. Aliaj ceteraj branĉoj situas en Srilanko, Filipino, Nepalo, Bangladeŝo kaj Honkongo.

En la jaro 2007 s-ro CHIMEDTSEREN partoprenis en la internacia amikeca evento "Bonvenon al Oomoto en 2007!" (74 partoprenantoj el 13 landoj), okazigita en la Oomoto-Centro, Ajabe, koncerne al la 92a UK en Jokohamo. Post tio li oomotaniĝis, havinte 5-tagan Kursaron de Oomoto

en Kameoka kaj Ajabe kun mia akompanado kaj interpretado.

Ekde la komenco de la jaro 2009, mi ĉiusezone deĵoris po 40-50 tagoj en la NRO "Mongola Centro de Universala Homama Asocio", kiu inaŭguris sian 6 etaĝan modernan domon kun la nomo "Azmon-Centro" en junio, 2008.

La okazigo de la 6a AK en Ulanbataro, 2010 estis unuanime decidita en la Bangalora AK, februare en 2008, de kiam MES startis organizi la AK-n kunlabore kun KAEM.

Temante pri la nombro de la membroj de MES, oni diris, ke ĝi estas ĉirkaŭ 30 kaj 8 el ili kapablas konversacii en Esperanto. Tamen, por esti sukcesa la 6-a AK, antaŭ ĉio MES kaj LKK-anoj plej urĝas plimultiĝi nove bakitajn e-istojn kaj paralele plialtigi siajn lingvajn kapablojn kiel eble plej frue.

Kun tia rapide plenuminda tasko mi tuj decidis instrui Esperanton kaj en mia oficejo kaj en mia apartamento al ĉiuj, kiuj simpatias al la agadoj de MC de UHA. Estas feliĉe, ke ĝis nun 21 miaj lernantoj inter 13 kaj 64 jaraĝaj daŭre lernas Esperanton cele al la AK kun entuziasmo.

Krom tio, mi, kunlabore kun MES kaj LKK gvidis la Esperantan klason ĉiusemajne unufojon dum tri monatoj, konsistitan el 25 studentoj en la kolegio "Shine Irgenshil". Somere en 2009, kiam mi vojaĝis al Pollando, okazis la 1-a Kurskunveno de






Esperanto en Mongolio, kiun partoprenis 17 el ili kaj MES ĉi-vintre planas havigi al si la 2-an kurskunvenon.

Cetere, restas alia kolegio nomata “ La Sociencia Instituto” kies gedirektoroj Tserendavga ENKEE kaj Lkhanaajav ODONTUYA estis iama lernintoj de Esperanto kaj tre afablaj subtenantoj de Esperanto, kaj ĉar antaŭ du jaroj ili enkondukis Esperanton en sian kolegion kiel oficialan lernoobjekton. Nun, 25 studentoj ĉiusemajne du fojojn lernas nian karan lingvon sub la gvido de s-ro Deogsuren KHURELBAATAR, vicprezidanto de MES kaj mi.

Unu el la kulminaj momentoj de Mongola Esperanto-Movado en 2009 estis la 9-an de decembro okaze de la Zamenhofa Festo en “Shine Irgenshil” kun 57 e-istoj novaj kaj malnovaj, al kiuj s-ro ENKHEE, prezidanto de LKK, akcentis tiel, ke ni, pacaj batalantoj, nepre sukcesigu la



AK-n, titolitan “Azia harmoniiĝo per Esperanto”, unuecigante niajn korojn por brilanta futuro de la homaro.

Jen estas la programo de la 6-a AK kiu elkore invitas laŭeble



plej multajn partoprenantojn el la tuta mondo: La ĉeftemo de la AK estas “Azia Harmoniiĝo per Esperanto!” La antaŭkongresaj ekskursoj okazos en la 16a-18a de junio en 2010, kaj la kongreso mem estos inter la 19-a kaj la 23-a de junio en la plej luksa hotelo Chinggis Khaan, Ulanbatoro. Kaj sekvos la postkongresaj ekskursoj de la 23-a ĝis la 28-a de junio.

Tiamaniere, la kongresa totala programo daŭros preskaŭ du semajnojn, kiam vi, e-istoj ne perdu tiun ĉi raran bonŝancon por esti fascinata de la kongreslando. Tiuj, kiuj deziras pli detale informiĝi pri la enhavo de la 6a Azia Kongreso de Esperanto, turnu vin al: www.mongolio.info www.esperanto.mn. Adreso: LKK de la 6a Azia Kongreso de Esperanto (ĉe Mongola Esperanto-Societo), Centra Poŝta Oficejo, Kesto 55, Ulanbatoro, Mongolio. Y a h o o - mesaĝilo: mn-esperanto@skype.com mongola.esperanto.societo



Vivo de Oomoto-fondintoj

Vivo de Deguĉi Nao kaj Deguĉi Onisaburo

2

Ito Eizo, tradukis Huĝimoto Tacuo

Nao familianiĝis al Deguĉi

En la sesa jaro (1853) de Kaej, Perry alvenis al Uraga kun militŝipoj, kaj premis *Bakufon* malfermi havenon; Nao tiujare dek-sepjara iĝis adoptita filino ĉe Juri Deguĉi, onklino en Ajabe.

Ajabe troviĝas en baseno najbare de Hukuĉijama. Ĝi estis modesta subkastela urbo kun dudek mil kokuoj de la familio Kuki; en grado de prospero ĝi restis sufiĉe malantaŭ Hukuĉijama. Ankaŭ la loĝantoj estis malmultaj. Plie, la vilaĝo Cubonouĉi, kie troviĝis la domo de Deguĉi, estis nur vilaĝeto, duone agrikultura duone komerca kun sescent kvindek kelkaj loĝantoj. La domo de Deguĉi estis meze de la domoj miksitaj de agrikulturistoj kaj de metiistoj iom for de la urba domaro.

Juri Deguĉi estis pli juna fratino de Sajo, la patrino de Nao. Ŝi iĝis adoptita filino de Masagoroŭ Deguĉi, loĝanta en Cubonouĉi, Koaza-Ŝinguŭ, vilaĝo Honguŭ en la sama Ajabe; ŝi edziniĝis kun Masahej Deguĉi (poste: Masagoroŭ), akceptita same kiel adoptita filo.

Ankaŭ pro tio, ke Masahej estis debila, malpliigis ne malmultan bonharon de familio Deguĉi. Masahej forpasis sep jarojn antaŭ ol oni akceptis Naon, kaj post tio la vivo de la familio Deguĉi iĝis nur malfacila. Estis tia Juri, travivanta en tiaj cirkonstancoj, kaj tiom pli malfeliĉe, mankis

al ŝi infano. Tial, ŝi tenis de longe la okulojn al Nao, infano de sia pliĝa fratino, kaj emis akcepti ŝin adopte.

Nao iĝis adoptita filino laŭ porpeto ĉe la familio Deguĉi, ŝi tamen unu fojon forrevenis sola al la domo en Hukuĉijama duonjaron poste. Tiel okazis ankaŭ pro tio, ke Juri malplaĉis al Nao, sed pli vere pro tio, ke ŝi devis stari fronte al konfliktoj inter la parencoj ĉirkaŭ la familio Deguĉi kaj ŝi ne povis elteni tion.

Juri postkuris Naon ĝis Hukuĉijama, kaj forte pretendis ankaŭ al Sajo, sia pliĝa fratino, ke ŝi nepre volu heredi la familion Deguĉi.

Juri sin ĵetis en puton tiuvespere kaj plenumis la finon. Je tio ne kulpis Nao; ŝi rankoris kontraŭ kruelaj batoj koncerne al la bonhavo fare de pliĝa frato de sia jam pereinta edzo kaj krome, la rilato de Juri kun viro kaŭzis nebonan onidiron kaj ŝi suicidis suferinte la maleblon reedziniĝi kun la viro. Juri estis en la aĝo de kvardek naŭ jaroj.

Baldaŭ poste, aperis animo de Juri al la sonĝo de Nao en ŝia dormado, kaj instigis intense la restarigon de familio Deguĉi. La sonĝo daŭris kelke da noktoj, kaj la pretendo de Juri neniam ĉesis.

Nao edziniĝis

Printempe de la dua jaro de Ansej (1855), la sekvantan jaron, post la morto de Juri, Nao iĝis

denove loĝanto en Ajabe. Nun ŝi estis dek-naŭ jara. Kaj, sen interspaco da tempo, Nao edziniĝis kun Tojosuke Ŝikata la dudekan de marto (la trian de februaro laŭ la malnova kalendaro). Tojosuke estis dudek-okjara ĉarpentisto. Li iĝis adoptita filo de la familio Deguĉi, kaj heredis la nomon Masagoroŭ.

Nao havis en sia koro destinitan personon en Nakamura de vilaĝo Anga en Hukuĉijama. Tiu viro rakontis al Nao pri sia vivplano post la edziĝo. Tamen, ankaŭ tiun sonĝon ŝi devis rezigni por la realo heredi la familion Deguĉi. Tio estis, por Nao, sufiĉe da spirita doloro.

Masagoroŭ ne estis de alta staturato, sed estis fortike ĉarpentista kaj akiris bonan reputacion, ke li “faras laboron en kiu ajn okupo por unu kaj duono da laborforto”. Estis certe, ke li estis ĉarpentisto kun bona brako, kaj ankaŭ post la edziĝo li prenis sur sin multe da grandskalaj konstruaĵoj.

Al tio ankoraŭ, li montris perfektan rezultaton, kiun najbaraj ĉarpentistoj eĉ enviis. Kaj la labormaniero estis tia, ke domplane li desegnas liniojn senĉese eldirante ŝercojn, kaj tamen konstruiĝis domoj, kiujn ankaŭ la kolegoj admiris ravitaj.

Kun bona brako en la laboro, lia karaktero estis malforta. Masagoroŭ ne povis pretendi prunedonitan monon, kaj li havis naturon, ke li restis ĉiel maltrankvila sen redono de prunteprenita mono. Io tia temis pri ne tiel grava afero; li estis senrivala sakeamanto, granda teatramanto kaj li ja estis eĉ rara optimisto.

Gajninte monon per siaj lertaj brakoj, li senĝene ĉiom forkonsumis. Kiam venis teatra grupo en turneo, li sekvis ĝin eĉ dek tagojn aŭ eĉ dummonaton, forgesante reveni hejmen. Se tiel, do estis neniu rimedo krom malriĉeco, kiom ajn bonan brakon li havis.

Kaj tiel, antaŭ Nao sin embuskis la sufoka

batalo por vivo. Tio estis io, kion ŝi ne povis forsvingi eĉ per la ĝisnuna, eksterordinara diligenteco kaj sincereco. Malfacileco kaj malfeliĉo, kiuj sinsekve atakis, turmentis Naon senindulge. Tio estis jam io severa, nenio krom la provoj fare de Dio. Nao paŝis kun la provoj sur la dorso. Ni laŭsekvu la spurojn.

La *Bakufu* estis devigita ŝanĝi la politikon de sia enŝlositeco ĉe la alveturo de Perry, kaj la epoko enpuŝiĝis en la periodon de politika kaj socia dismoviĝo de la *Bakuf*-fino. Cetere, eĉ tiaj hastaj ondoj de la dismoviĝo ne tuj alŝoviĝis al la malgranda daimiujo en Tanba.

Nao translokiĝis al Cubonouĉi, Honguŭ

Masagoroŭ, edziĝinta kun Nao, nove konstruis domon en Cubonouĉi, Ŝinguŭ. En tiu loko de malnova tempo, iel kaj tiel okazis plago, tiel ke neniu el la vilaĝanoj pro timo ne volis konstrui domon. Ĉe tia afero neniom sin ĝenis Masagoroŭ. La loko estis ĉirkaŭ la puto de la arĝentklara akvo Ginmeisui nordookcidente de la preĝejo Miroku de Oomoto en la nuna tempo, nome la loko nomata “eksdomtereno”.

Somere je la aĝo de dudek jaroj Nao naskis tiudome la unuan filinon Jone. Ĉe la komenco de geedziĝo restis la domo kun tereno, kampoj, tenejo k.a.; ankaŭ Masagoroŭ funkciigis la ĉarpentistajn brakojn, kaj estis neniu mallibereco. Eĉ tio tamen daŭris apenaŭ unu, du jarojn. La karaktero de Masagoroŭ estis tro senĝena. Sed sen inklino, li neniam metis la manon al sia okupo.

Ankaŭ negoce, li estis mallerta, kaj ripetis deficitajn ankaŭ en surpranita labortasko. Kaj, dum Nao ne sciis tion, li vendis po iom el la bonhavo de la familio Deguĉi por havigi al si sakekostojn. Plie, parencoj, kiuj profitis la naivecon de Masagoroŭ, alprenis al si liajn havaĵojn dirante:

“Mi pruntedonis monon al la antaŭa generacio.”; “Mi havas promeson ricevi pecon da kampo.”; “Mi pruntedonis artiklojn.” Krome, eĉ Toŭbej Cujimura, kiu estis svatanto por ambaŭ, trudis al Masagoroŭ pruntepreni monon kontraŭ alta interezo.

Tiu Cujimura, eksterkutime, venis en la Novjara Tago kaj postulis al Nao redoni la monon. Nao fojfoje sin kaŝis kaj larmis, opiniante, ke li ne bezonus veni ĝuste en la novjara tago.

Tial, la ne malmultaj rizplantejoj kaj kampoj, transiris unu post alia en la manojn de aliaj. Masagoroŭ, kiel ĉiam, ankoraŭ trinkadis sakeojn eskalade, kaj diligentis en spektado de vilaĝaj teatraĵoj. Pafante serion da ŝercoj li disipis monon. Nature, ne prosperis al li la laboro, kaj ĉesis enspezoj; al Nao ekmankis eĉ rizo por la morgaŭo. (ĉe la kazo de Masagoroŭ, oni povus diri pli, ke li estis iom abnormala, ol ke li estis optimista.) Lia karaktero vere taŭgis, por ke la familio pereu en mallonga periodo.

Ĉu ankaŭ tiun ĉi edzon, por la provado je Nao, preparis Dio? Nao silente elportadis la suferojn. Ŝia malmultevorteco ankaŭ ŝajnis iriti la edzon.

Nao, post la nasko de Jone la unua filino, akuŝis tri infanojn; tamen ĉiuj tri formortis tuj post la naskiĝo. Estis en tempo, kiam Nao estis dudek-sesjara, ke Koto naskiĝis kaj daŭre vivadis kaj iĝis la dua filino. Du jarojn poste, ŝi naskis la unuan filon Takezoŭ. Tio estis en la unua jaro de Ganĵi (1864). Dume, en Hukuĉijama, la plijuna fratino Rijo mortis en la unua jaro de Bunkjuŭ (1861), kaj la patrino Sajo respiritiĝis kvar jarojn poste, en la unua jaro de Kejoŭ. Tio estis en la okazo, kiam Nao estis dudek-naŭ jara.

Plie, nur en la dek unua tago post tio, la avino Take postsekvis ŝin. Tiel, la personoj, kiuj naskigis Naon en tiu ĉi mondo, ĉiuj malaperis; la tempo finfine komencis transmoviĝi de la *Bakuf*-fino al la

Meiji-restaŭro.

Serio da paŭperismo

La nova politikpotenco, kiu sloganis la *Bakuf*-faligon kaj revenon al la rojala politiko, iĝis nova reganto super la tuta lando de Japanujo tra post la intensiva civila milito, kaj iĝis nun “la noviĝo”.

En la komenco la regiono Tanba en sia tuto ne ricevis ties influon, tamen rezolute farita estis la formeto de daimijo kaj pormeto de prefektujo, tiel ke la daimijo Ajabe estis baldaŭ enplektita en la subprefektujon Ikaruga en prefektujo Kioto. Kaj laŭ tio, ke oni agnoskis la liberecon elekti profesion, ŝajnis ke la ondoj de ŝanĝo komencis lavi eĉ ĉiujn angulojn de vilaĝo. Tiuj ondoj iĝis evidentaj je la moderniĝo, diversaj politikoj por la kapitalismiĝo, la sistemo de konskripcio, la alprenado de la sistemo de la deviga edukado, k.a.

En tia periodo ekleviĝis la religio Tenri-kjoŭ el la baseno Jamato, kaj ĝi komencis fari antaŭenpaŝojn en la direkto de Osaka.

Tenri-kjoŭ celis, kun la agocentro je la realmonda saviĝo, savon de la homoj ricevantaj subpremon. Estis en la dudekaj jaroj de Meĵi, kiam tiu ĉi Tenri-kjoŭ ekeniris en la intermontan regionon de Tanba. Kaj, ankaŭ la religio Konkoŭ-kjoŭ, kiu staris jam en la regiono Sanjoŭ, preskaŭ samtempe montris sian vizaĝon en Tanba. Krome unu alia religio Kurozumi-kjoŭ jam en la epoko *Bakuf*-fino, direktis al Ajabe.

Nu, kian influon donis al la geedzoj Masagoroŭ kaj Nao, loĝantaj ekster la subkastela urbo Ajabe tiu ĉi metamorfozo de la Meĵi-restaŭro? Tio almenaŭ supraĵe alportis nenian ŝanĝon, kaj oni povas diri, ke nur daŭris la severaj kaj doloraj suferoj de Nao.

En la dudek tria tago de la unua jaro de Meĵi (1868), Nao naskis la trian filinon Hisa, en la aĝo de tridek du jaroj. Kaj ŝi naskis la duan filon Seĵkiĉi la

tridekan de junio de la kvina jaro de Meĵi, kiam ŝi estis tridek sesjara.

En tiu jaro la geedzoj, Nao kaj Masagoroŭ, surfundiĝis en la ĉiutaga vivo, kaj devis forvendi la duetaĝan domon en Cubonouĉi, en kiu ili alktimiĝis loĝi; kaj ili ekloĝis en la supra etaĝo de terefarita tenejo. Tiukaze, ili ellasis la dek sesjaran unuan filinon Jone al la domo de Ĉuŭbej ĉe Kitaniŝi-maĉi kaj la dek-jaran duan filinon Koto al la domo de Sejbej Kirimura ĉe Okano-dan, respektive por servi kiel infanvartantoj. Sejbej transloĝiĝis al Okano-dan de sia naskiĝdomo ĉe Koja-maĉi kaj, heredinte la familion Kirimura, okupiĝis per uruŝio.

Ĉe Masagoroŭ, aldone al la denaska kaprico, malkreskis ankaŭ la korpa forto kune kun la jarkresko. Tian edzon Nao subtenis preskaŭ morte, kaj ĉiel klopodis en zorgado. Foje ŝi estis eĉ surloke de la ĉarpenta laborado, kaj energie helpadis en prifarado de muroj, terlevado, transportado de kaheloj. Malgraŭ tia persistado de Nao, ili estis alpremitaj, ke ankaŭ la loĝejon sur la supra etaĝo de la terfarita tenejo ili devis post duonjaro transdoni al la manoj de alia; ili transloĝiĝis al la luita domo de numero tridek de Kammaĉi.

Nao komencis ĉi tie komercon de trinko kaj manĝo. Ŝi faris kaj vendis tofunon, kaj manĝuojn, kiujn fari ŝi lernis estante knabino en la domo, kie ŝi servis. En la sezono, kiam kreskas la kverk-folioj, ŝi prifaris ankaŭ kverk-moĉiojn.

Dume, Masagoroŭ forperdis eĉ la karan ilkeston; li eliris kun nur kelke da laboriloj pakitaj en mantuko pendanta de la brako.

Foje li paŝis kun pendanta tuko kun ŝtonetoj sur la ekstremo de hundoŝo (lumbotuko), tial la infanoj amuzitaj alvenis ĉirkaŭen. Li fajfante la malriĉecon kaj la animan suferon de Nao, ĉirkaŭpaŝas ĉiam nur ludante.

La dolora malfacileco de Nao konsistis ne sole

en diboĉado de edzo kaj alpremita vivo, sed ankaŭ plie en la mensa sufero el parenca skandalo.

En la oka jaro de Meĵi (1875), la unuan filinon Jone, dek-naŭjaran, oni edzinigis al agrikulturisto ankaŭ loĝanta en Ajabe; kiam pasis ne nur duonjaro, Jone estis forkaptita de vetludisto nomata Ŝikazoŭ Oŭcuki, kiu deflanke enamiĝis je ŝi, kaj rezulte, ankaŭ Jone inkliniĝis al Ŝikazoŭ. Ŝikazoŭ estis ja ekzisto timata estante vizaĝrolulo loĝanta en urboparto Kitaniŝi-maĉi. Nao mem nature, ankaŭ Masagoroŭ evidente ne estis trankvilaj kaj ili ne devis permesi la kunuliĝon de ambaŭ.

En tiaj perturboj ankaŭ la trink- kaj manĝ-komercio de Nao ne kreskigis la vendprezojn, kiom atendite, kaj ŝi ĉesis komerci, kiam pasis ĉirkaŭ kvar jaroj de la malfermo.

Nao relokiĝis al Cubonouĉi, kie poste Dio kaptis ŝin

Tiam ili konstruis malgrandan loĝejon sur la tereno de sep aŭ ok cuboj, kiu apenaŭ restis ne vendita en Cubonouĉi, Ŝinguŭ, kie ili loĝis baldaŭ post la geedziĝo. Tio estis en la naŭa jaro de Meĵi (1876). Nao ankaŭ ĉi tie vendis manĝuojn vice metitajn, kiujn ŝi mem faris kaj en tiu ĉi eta domo, poste en la korpon de Nao falos la dispirito de Dio Uŝitora.

Ke Nao de sia infaneco havis solidan naturon je la koro kredi, tion ni jam rakontis. Ankaŭ post maturiĝo, kaj kie ajn, ŝi primetis altaron en sia loĝejo. Nao pendigis kakemonon kun apudskribitaj dinomoj: “Amaterasu-Oomikami, Haĉiman-Dajbosacu, Kasuga-Dajmjoŭĵin”, kaj ŝi deklamis kun kunmetitaj manplatoj, oni rakontas plie, ŝi apoteozis ankaŭ Budaon kaj prapatrajn spiritojn, kaj al tiuj ĉi ŝi prezentis teon.

Kaj ties restaĵojn ŝi verŝis en kloaketon dirante, ke ŝi “donacu al la malsatogro” kaj tiel pormetis

al la senparencaj budaidoj. Ŝajnas, ke Nao jam konsciis ankaŭ la animojn, kiuj defalintaj, ne povis trankvile iri al la alia mondo.

En la deka jaro de Meĵi (1877), kiam Nao estis kvardek-unujara, naskiĝis la tria filo Denkiĉi. En la dek-dua jaro, Nao konfidis la dek-unujaran Hisan al la naskiĝdomo de Masagoroŭ. En la sekvanta jaro, kiam Nao estis kvardek-kvinjara, naskiĝis la kvara filino Rjoŭ.

Samjare, Ŝikazoŭ Oŭcuki diris, ke “ĉar mi malhavas infanojn, lasu al ni lin adopti”, kaj li prenis kun si Denkiĉi-n, kiu ĵus fariĝis du-jara, kaj tiel li metis lin domicile en la familio Oŭcuki.

La rilato inter Ŝikazoŭ kaj Jone estis jam publike konata, kaj ŝajnis, ke tio estis jam supre, kien atingi oni ne povis mane, sendepende de tio, ĉu Nao kaj Masagoroŭ tion permesos aŭ ne. Ŝikazoŭ ŝajne havis talenton komerci, kaj komencis kaj prosperigis viandvendejon de bovaĵoj, kiu estis tiam ankoraŭ rara.

Ankaŭ Jone, kiu estis sidanta kiel la edzino, iĝis harplektisto; ankaŭ tiu ĉi prosperis. Tiel ironie, la familio Oŭcuki rimarkinde leviĝis en la ekonomia stato, kaj la vivo de la familio Deguĉi rulfalis malsupren.

La dua filino Koto iĝis dek-naŭjara en la dek-kvara jaro de Meĵi kaj edziniĝis kun Ŝoŭzaburoŭ Kurijama, kiu tenis gastejon en Oŭĵi, vilaĝo Ŝino en Kameoka. Takezoŭ la unua filo iĝis dek-okjara en la dek-kvina jaro de Meĵi(1882), kaj li fariĝis disĉiplo en ĉarpentado ĉe Kiĉizoŭ, kiu estis disĉiplo de Masagoroŭ.

Sumi, la dua gvidantino naskiĝis

En la sekvanta, dek-sesa jaro de Meĵi(1883), la trian de februaro, en la tago, kiam senĉese faladis kaj surkuŝiĝis neĝo en kotonflokoj, tiam kvardek-sepjara Nao naskis la lastan infanon Sumi: Ŝi estas

la persono, kiu poste estis die destinita kiel la dua spirita gvidantino. Ankaŭ en la tago, tiam tiu Sumi naskiĝis, Masagoroŭ malestis hejme, elirinta de la antaŭa tago por spekti tiam prezentatan provincan teatraĵon.

Nao Deguĉi naskis sume dek unu infanojn, kaj el kiuj tri ŝi perdis frue, sekve ŝi vartis tri knabojn kaj kvin knabinojn en la malfacila vivo, kaj en la domo restis nur la dek-jara Sejkiĉi, Rjoŭ kaj Sumi.

Nao prifaris skatollunĉon por la edzo, zorgis lin tiel kaj ĉi tiel, ŝi tamen ne kalkulis lin ekonomie, ĉe ĉiu afero, ŝi certigis al si, ke ŝi mem devas perlabori kaj kreskigi la infanojn.

Nao kun la bebo Sumi en la brako kaj la kvarjara Rjoŭ sur la dorso muelis ĉirkaŭ kvar-ŝoan rizon je faruno ĝis malfrue en ĉiu vespero kaj faris manĝuojn. Oni nomis tion retombrela moĉio.

En postaj jaroj la lasta infano Sumi diris jene: “Kiom agrable mi aŭdis la sonon de senĉese moviĝanta ŝtonmuelilo turnata de la patrino. Je la mirindeco, la tiama memoro apenaŭ restas bela ĉe mi kvazaŭ ĉielarko.”

La retombrelan moĉion, kiun faris Nao, Sejkiĉi kolportis por prezo; unu peco kontraŭ tri rinoj. Por ties enspezo oni aĉetis rizon, kuiris mikskaĉon; la restaĵon oni muelis je faruno kiel materialo por manĝuo; krome, Nao diligentis ankaŭ je prifaro de la ligrimeno de getao, kaj tiel kontribuis por kalkulo de la vivo.

Plie, por gajni monon vivi, en somero ŝi plilongigis la eliradon al subprefektujo Norda Kuŭata kaj Kameoka, lasante la tri infanojn hejme, kaj tie ŝi perlaboris per fadentirado. Tiri fadenojn signifas ŝpini el kokonoj, nome la laboron volvi sur ŝpinradon kuntorditajn fadenojn el lino kaj kotono.

Ĉiufoje, kiam venis somero, ŝi iris tien kaj ĉi tien de ŝia juneco por tiri fadenon. Al Nao plaĉis tiu ĉi fadentirado, kaj ŝi estis tre lerta kaj oni diras,

ke ŝi eltiris bonajn fadenojn. Kia tamen korinterno estis ĉe Nao, kiu devis eliri por laborenspezi lasante la infanojn dome, por longa periodo je dudek tagoj, aŭ je unu monato. Iufoje, kaldronon kun bolataj kokonoj Nao misprenis malkutime.

Unu el la ŝpinkamaradinoj miris spontane: “Ho, Naonjo, kio al vi okazis ?!”

“Jes, kiam mi pensas pri la infanoj, zorgo min kaptis...” kaj ŝi pardonpetis. Kaj foje okazis tio, ke al ŝi oni forŝtelis ĉiom de la salajro ricevita por du monatoj da ŝpinado Nao tiam pensis pri la familio en sia dometo, kaj ne povis reveni hejmen kun nenio en la manoj; ŝi elpetis ĉe iu farmisto kaj faris sarkadon en rizkampo kaj ricevis iomete da pago kaj tiel apenaŭ revenis hejmen.

En la dek oka jaro de Meĵi(1885), Sejkiĉi dek trijara iĝis metilernanto ĉe persono nomata Tora, kiu okupis sin per paperfarado.

En iu mateno de tiu jaro Masagoroŭ estis preta eliri al laboro kun ĉarpentiloj, kiam Nao alvoĉis: “Hodiaŭ, mi ne scias kial, tamen bruste mi sentas timon senpacience, do volu esti aparte atenta.”

Tiu brustmaltrankvilo de Nao iĝis ja reala, kaj Masagoroŭ falis en la laborloko de alta tegmentorando kaj batis al si la iskion. Tiu vundo, ĉu sub la influo de saketrinkado dum jaroj, elvokis paralizon, kaj li devis kuŝi en lito. Super Nao plimultiĝis nova laboro aŭ flegado de la edzo.

Nao ne povis plenumi ĉion nur per siaj manoj, do ŝi revokis al si Hisa-n kiu estis konfidita antaŭ ses jaroj al la naskiĝidomo de Masagoroŭ. Hisa estis jam dek sep-jara.

Al Nao alvenis alia malfeliĉo. La unua filo Takezoŭ, kiu estis metilernanto de ĉarpentado, intencis suicidi pikante al si la gorĝon per ĉizilo kun motivigo, ke al li ne plaĉas esti ĉarpentisto. Aŭdinte tiun informon, Nao tuj alkuris tien. Takezoŭ povis reteni al si la vivon, kaj oni revenis hejmen kun li

sternita sur pordotabulo.

La grave vundita Takezoŭ kuŝis kun kapkuseno apud kapkuseno kune kun la patro. Sed la vundo de Takezoŭ resaniĝis eksternsupoze pli frue kaj, kiam li povis jam apenaŭ moviĝi, li tuj foriris en la direkto al Kioto, kaj tiel iĝis homo sen spuro.

Estante ankoraŭ en la daŭro de tiaj malfeliĉoj, Masagoroŭ pafadis la plaĉan sarkasmtankaojn kaj ŝercojn dirante : “Ĝenas min la korpa mallibereco, sed ke mi havas humoron ekkanti eĉ kanzonojn. ”

Nao subtenis la vivon de la familio

Nao devis subteni la vivon de la familio kun la edzo malsana, kaj kun la junaj infanoj. Ankaŭ la vendadon de manĝuoj, kiun ŝi tenis dum longa tempo, ŝi ĉesis, ĉar per tio ŝi ne povis kovri la kurackostojn de Masagoroŭ. Tion peze influis ankaŭ tio, ke Sejkiĉi, kolportinta ĝis tiam la manĝojn, foriris por fariĝi metilernanto de paperfarado. La laboro tiri fadenojn estis nur somere. Al Nao, jam ne juna, ekzistis krome nenia laborspeco. Precipe la tempo estis meze de depresio, kaj tiam en la proksima ĉirkaŭo de Ajabe ne povis ekzisti bona laboro.

Finfine Nao, plene embarasita, komencis aĉeti paperĉifaĵojn. Tio estis okupo, relative profitdona, kaj por tio oni ne bezonis apartan kapitalon, tamen ĝi estis tre peza laboro.

Por aĉeti paperĉifonaĵojn Nao portis piedojn al proksimaj vilaĝoj, al la hejmloko Hukuĉijama, kaj eĉ ĝis la malproksima Mijazu. Nao leviĝis frue en la mateno, antaŭ ĉio preĝis je Amaterasu-Oŭmikami, kaj al Hisa, Rjoŭ kaj Sumi, ŝi ripetis ĉiutage la samon nome: “Volu purigi la ĉirkaŭon de la domo, por ke ne kresku herbaĉoj; al la objektoj de aliaj personoj ne metu la manon, eĉ je unu pajlo.” Kaj, kun dolĉa rideto. Ŝi eliris. Estis ne malofte, ke ŝi iris komerci eĉ ĝis lokoj, kiuj estis je distanco de dek du kaj

dudek kilometroj, tiel ke estis ofte post la oka, kiam ŝi revenis hejmen.

Sumi kaj Rjoŭ aŭ flegis la patron, aŭ ludis kun amikoj, sed en vesperiĝo ankaŭ la geamikoj malaperis; la patrino tamen ne revenis. Ĉiuj domoj fermis la pordojn kaj mallumiĝis ĉirkaŭe. Ili ĉiutage atendadis senpacience nur la revenon de la patrino kun timema koro.

“ Tiaman solecon mi eĉ ankoraŭ nun ne forgesis, ” rakontis Sumi poste. Ĉu nun, jam nun, ili atendadis patrino kaj, ne eltenante, ili eliras eksteren kaj rigardas malproksimen. Nature, iliaj piedoj iras antaŭen je unu paŝo, du paŝoj. Kaj baldaŭ, apenaŭ aŭdeble la piedsonoj de pajlsandaloj diskrete proksimiĝas; Rjoŭ kaj Sumi saltas tiudirekten kaj diras: “La patrino bonvolis reveni.” Nao per tenera voĉo: “Jes,” diris kun rideto. Kaj la manojn de ambaŭ ŝi firme premas kaj ili kune iris hejmen. Survoje al la hejmo foje Nao pretekstis: “Eĉ se mi pensis reveni frue por vi, tamen al mi la piedoj ne funkcias, kiom mi volus.”

Alveninte hejmen, ŝi selektas respektive paperĉifaĵojn, fliktukojn, lanĉifaĵojn kaj ŝi kunportas ilin al pograndisto por ricevi monon. Restigante ĉe si sumon por morgaŭ, kaj per la restanta mono ŝi aĉetas iomete da rizo kaj revenas hejmen. Kaj ofte okazis, ke per la rizo oni povis apenaŭ kuiri vesperan kaĉon kun herboj. Eĉ tiun herbokaĉon Nao ne manĝis ĝissate. Rizbulon, faritan kunporti lunĉe, ŝi lasis ofte ĉe la matena eliro: “Manĝu ĉi tion,” ŝi diris kaj donis al Rjoŭ kaj Sumi.

Revenvoje de la malproksima Mijazu, kien ŝi iris aĉeti paperĉifaĵojn, en la montopasejo Hukoŭ en la monto Oŭe, ŝi renkontis danĝeron perdi eĉ vivon pro granda neĝo. Kun la peza ŝarĝo sur la dorso, ŝi ne povis iri antaŭen kaj ŝi preskaŭ perdis konscion pro la amasiĝinta malsato, laciĝo kaj malvarmo; en la neĝo falanta kaj kuŝanta ŝi imagis

pri la malsana edzo kaj la junaj infanoj, atendantaj hejme; ŝi rekolektis al si la animon kaj kun apenaŭa vivo ŝi eniris la vojon al la hejmo post la superita montopasejo.

Sumi kaj aliaj, lite en la profunda nokto, brakumis unu la alian reciproke; ili atendas la piedsonojn forgesante la malvarmon. Tien apenaŭ revenis Nao el laciĝita. Estante malvigla, la patrino staris ĉe la pordo, forviŝante neĝerojn senkonscie de sur la hararo kaj sur la ŝultroj. Vidante la figuron, la kuŝantaj Sumi kaj aliaj salte leviĝas kaj, mi-la-unua-konkure, ĵetis sin en la sinon de Nao.

La morto de Masagoroŭ, la edzo

Masagoroŭ, en la komenco de sia kuŝo, kondutis arbitre kiel kutime, dirante, ke oni aĉetu sakeon, senŝeligu piron. Al tia edzo Nao naive obeis; krom tio, ŝi energie strebis flegi lin, dirante: “Se vi volas ion ricevi, diru al mi, kion ajn, mi petas.”

Masagoroŭ grade iĝis kvietaj, devigita vole-nevole vidi, en la longa daŭro de kelke da jaroj, kiel Nao laboris kaj kiel severa estis la lukto por vivi. Kaj iom post iom ĉe li fontis koro de introspekto. Baldaŭ la amo de Nao penetris al li en la korpon.

Fine, li eĉ eklarmis: “Mi ĝis nun kondutis nur plaĉe kaj arbitre... Tia kompleksa edzino kiel vi estas ja domaĝinda.”

Masagoroŭ, kiam Nao eliris por aĉeti paperĉifaĵojn, kunmetis el la kuŝejo al si la manplatojn al ties dorsfiguro, per la tremantaj manoj, kiujn pro paralizo li ne povis libere movi.

Estis ankaŭ io jena: por flegi Masagoroŭn Hisa estis reveninta de Jagi, kaj ŝi murmuris ne tolerante vidi la suferon de la patrino: “Estus bone al la patreto, kiu ja ĉiam kuŝas nur tiel, se li prefere formortus.”

Nao, kiu aŭdis ĝin riproĉeme, admonis

eksterkutime severtone: “Kion vi aŭdacas diri ! Por vi la infanoj la persono, kiun vi povas voki la patro, estas nur tiu ĉi patro inter la ĉielo kaj la tero, eĉ se vi traserĉus tian en metalaj sandaloj. La malsano bezonas antaŭ ĉio flegadon; ĉe malbona flegado eĉ kuracebla malsano ne kuraciĝas.

Probable vin tedis la zorgado; mi mem pensas, ke ankoraŭ mi ne sufiĉe lin zorgadis. Por ne penti poste, ni per ĉiuj fortoj lin zorgadu.”

Fine de februaro de la dudeka jaro de Mejji(1887), pli malboniĝis la malsanŝtato de Masagoroŭ. Li konsciis verŝajne la momenton de sia morto, kaj diris per voĉo senforta: “Kara Naonjo, longe vi prizorgis min, mi tamen povus baldaŭ morti... Ĉe adiaŭ al tiu ĉi mondo, mi ja ŝatus trinki taseton da sakeo.” En tiu tago, malbonŝance estis neniu monero ĉe Nao. Artiklo, kiun oni povis ŝanĝi je mono, estis nur unu, nome pesilo la komercilo.

Nao iris kun la pesilo al lombardisto kaj petis pruntepreni tri senojn; sed la lombardisto malafable redonis ĝin kun diro: io tia ne povas esti lombarda hipoteko. Senfare Nao kun la pesilo en la mano direktas sin hejmen en pensado per lantaj paŝoj. Survoje, ŝi haltis ĉe la domo de Oki Umehara, la kamaradino en paperaĉetoj, kaj rakontis la kialon, kaj ŝi klinis la kapon petante, ĉu ŝi ne bonvolus pruntedoni sakekoston kontraŭ la pesilo.

Oki ne akceptis la pesilon, kaj pruntedonis nur du senojn. Per tiuj ĉi moneroj Nao aĉetis sakeon kaj revenis hejmen.

La edzo ĝojis. Li levis dume la korpon kaj la sakeon, kiun porverŝis Nao, li eltrinkis kaj elspiris hue.

“Ha, bonguste! Post tio ĉi mi deziras nenion en tiu ĉi mondo.” Kaj li denove rekuŝiĝis la korpon.

Post tio pasis ne pli ol kelke da tagoj kaj en la unua tago de marto (la sepa de februaro, laŭ la malnova kalendaro), mortis Masagoroŭ. En la aĝo

de sesdek jaroj.

La funebran ceremonion oni faris per la kostoj, donitaj de la najbara societo, kaj oni rakontas, ke temis pri vere soleca funebra ceremonio. La aspekton de tiu ĉi tro triste soleca funebro Sumi rakontadis eĉ en postaj jaroj.

Kun la morto de Masagoroŭ finiĝis la tridekdujara edzineco de Nao. Nao estis kvindek-unujara.

Tie ĉi ni ŝatus iom rakonti pri Masagoroŭ. Kiel la kaŭzinto de la suferita baraktado kaj malriĉeco de Nao, li estis, ankaŭ en la ĝisnunaj biografioj de Nao, traktata kvazaŭ malbonrolulo plibeliganta tiel Naon. Ankaŭ en tiu ĉi libro, la ĝis nuna priskribo nature sekvis tiun tonon. Oni tamen povas havi alian vidpunkton.

Masagoroŭ, ĉarpentisto majstra

Kiel ĉarpentisto li estis majstra. Kolegoj inter ĉarpentistoj lin enviis, kaj estis eĉ ĵaluzaj pri tio, ke li konstruis belan nombron da tricent bonaj domoj. Ĝenerale estas konate, ke geniulo eminenta en unu metio aŭ arto, estas fremda je la sekulara demando.

Preninte sur sin la konstrulaboron, li ofte perdis. Tenante ĉe si disĉiplon, li tuj lin emancipis, kiam pasis la jaroj de servado, kvankam estis tiutempa kutimo, ke la disĉiplo danke servu ankoraŭ unu jaron post la fino de la regula servo. Estis nature esti malriĉa kun tia maniero, tio estis tamen brava ago.

En la moderna socio, en kiu oni konas valoron vivi nur en famo kaj mono, la vivmaniero de la majstro Masagoroŭ, kiu estis malavara, neprofitema kaj senzorga, estis unu dozo da refreŝigilo.

Li amis sakeon, sed li evitis regalitan sakeon. Ankaŭ sakeon, legalitan por gratuli la firstolevon, li akceptis nur je unu boteleto, kaj poste li vizitis tavernon Toranoja, kie li estis kliento, kaj li drinkis proprakoste.

Antaŭe ni iom menciis tion, ke li estis forta en la versado de satiraj tankaĵoj kaj vortludoj:

Dom' konstruita
En ruĝa okro kvazaŭ
Templo Inari;
Ne estas sonorilet'
Interne nur malplena.

Ĉiam la kor
Ekprintempiĝas en mi
Post saketrinko:
La ŝuldopretendanto
Voĉas kvazaŭ ugviso.

Kvankam mi aŭdas
Sonojn el la najbaro
Pisti moĉiojn,
Tamen en mia domo
Mi apenaŭ nur spiras.

Ĉe ties legado oni sentas neniom da anhelantaj elspiroj. Tia ĝisfunda optimismo ŝajnas esti heredita en la sango de la lasta infano Sumi (la dua spirita gvidantino). Sumi, kiu pasigis kiel juĝoto ses jarojn kaj kvar monatojn je la dua Oomoto-afero, ĉiam diris: "Dankinde ; bone". Ŝi parolis kun paseroj ekster la fenestro, ludis kun blatoj, kiuj survenas genuen; kaj intertempe, ŝi faris multe da belaj tankaĵoj kaj poemoj kvazaŭ infankantoj, ĉu tio ne estas faro de la animo heredita de Masagoroŭ?

Ofte okazas, ke io rigardata kiel manko, fakte estas forta konsiderata de alia angulo. La karaktero de Masagoroŭ devus esti pli pozitive taksata.

En dudeka jaro de Meĵji(1887), la tria filino Hisa, kiu unu fojon estis hejmen reveninta por la flegado de la patro, iris servi en la direkto de Jagi.

Nao devis ankoraŭ ĉiam daŭrigi la aĉetadon

de paperĉifaĵoj. Frumatene ŝi leviĝis, ligis al si la hararon turnovolve, kaj eĉ en vintro ŝi estis en striita simpla kimono kaj en papervolvita pajlsandalo, kaj kun dudek monnoj kaj paktuko en la manoj ŝi eliris lasante hejme du filinetojn Rjoŭ kaj Sumi. Dek monnoj egalas al unu seno, la dudek monnoj egalas al du senoj. Tiam unu ŝoŭo (1.8 litroj) da rizo kostis kvar senojn, do per la kapitalo de du senoj, kiom da profito oni ricevos, tion oni ja povus imagi. Tia vivo daŭris tiom da jaroj.

La kanto de Sumi pri lampiro

Sumi atingis la aĝon, en kiu oni nuntempe ekiras al elementa lernejo. Ĉirkaŭ la tempo por vespermanĝi, ŝi ĉiam iris eksteren por iri renkonte al la patrino. Frusomere, kiam ŝvebas lampiroj, ŝi supren venas sur la digon laŭ rivereto kantante: Venu lampiroj ni kune ludu,

Inter la kurtenoj de salikobranĉoj ni kune ludu.

Kiam ŝi trovis lampiron flugantan super la riversurfaco, Sumi eniris ĝis en la rivero, kaj pelis absorbite lampirojn. Eĉ ĉirkaŭpaŝante plaŭd-plaŭde en la rivero, ŝi ne preteraŭdis la piedsonojn de Nao revenanta.

Aŭdante la paŝsonojn de la patrino ŝi, lasante eĉ la lampirojn, elsaltis el la rivero, kaj kuras serĉante la figuron de Nao. En posta jaro, eĉ en ĉelo dum ses kaj iom da jaroj de la Oomoto-afero, ŝi kare multe da fojoj sopiris la tiaman belan scenon kun la lampiroj kruce interflugantaj en la vesperiĝo kaj la patrinan piedsonadon. Kaj ŝi versis jenan poemon:

Hejmlok' kare sopirata en infantempo,
la patrin' ĉiutage nur perlaboras,
De frue en mateno ĝis malfrua nokt'
Kun fratino duope ni domon gardas,
Dum la tag' ni petolas kaj kune ludas,
Sed kiam vesperiĝas,

Ni soleciĝas,
Renkonte al patrino
Ni ja duopas.
En rivero laŭ la vojeto
Je riverstrio
Venu lampiroj ni kune ludu.
Riverborde jen haltas lampiroj.
Kun kuspita lumbo ni
Kaptas lampirojn,
Diskrete aŭdiĝas jen
la paŝadsonoj.

Vidante la patrino
Ni kune saltas,
La patrino ridetas larĝe al ni du,
Kaj revenas hejmen nun kun niaj manoj,
En mallumo en hejmo
Ŝi fajrile ekfajras
Kaĉ-kaĉ-kaĉ,
Apenaŭ helas lanterno
Ĵus lumigita.
Mankas oleo dediĉi al la Dio
Kun la fajreto sur meita
Dediĉita al Di’,

Meita signifas fajrligneton aŭ lignopecon, kiu estas ŝmirita per sulfuro sur ekstremo de maldika tabuleto el kriptomerio aŭ komeciparido. Kaj el tiu oni transmetas fajron al alia. Nao ĉiu vespere levis alten la fajron kun la lignopeco en la mano por dediĉi al Dio.

La ĉiutaga vivo neniom ruliĝis en bonan direkton, kaj tamen Nao neniel perdis en la koro. Ŝi montris neniom ion falantan de la malriĉeco; ŝi estis ĉiam pura eĉ en kotona, simpla kimono, kun ĝustaj faldoj. Ankaŭ kaphararo

estis ĉiam orde ligita. Vidante tian Naon, sinjorinoj de la urboparto interparolis jene: “Sinjorino Nao, portanta kimonon gluitan, aspektas pli impona, ol aliaj en silkaĵo.”

La dua spirita gvidantino Sumi poste rakontis: “Tion mi klare memoras el mia infankoro; tion mi intime fieris kaj ĉiam sopiris la patrino.”

(daŭrigota)

Jaŝireto supre de la monto Misen



LA SPIRITA MONDO ESTAS LA ORIGINO DE EKZISTO

1

Hidemaru Deguči, tradukis Eizo Itoo

La vidpunkto de edukado

La baza rimedo por la rekonstruo de la socio estas disvastigo de la edukado.

Kiam kompletiĝas la memkonscio de la popolo, per si mem altiĝas la nivelo de la socio kun bona interharmonio. Kaj la vera memkonscio estas ebla nur per la edukado.

Estas fraŭlino, kiu estas plene taŭga je edziniĝo en la aĝo de dek ses jaroj. Estas dekokjarulino, kiu ĝuste taŭgas edziniĝi. Estas diferenco inter la tempoj de matureco de ĉiu individuo, ne nur korpe sed ankaŭ anime. Estas homoj de frua maturiĝo, estas homoj de malfrua kompletiĝo. Do oni ne povas ĝeneraligi la aferon.

Precipe tute ne fidinda estas la taksado de infanoj far de la elementa lernejo. Ĉiu en la infaneco tenas en si kapablon, tute ne antaŭkalkuleblan. Tial doni al infanoj vicnumerojn de la kapablo aŭ publikigi poentojn de la ekzamenoj, estas agoj grave malhelpaj rilate ilian estontecon.

Ne estas vera kapablo, nur

kompreni logikojn aŭ memori multajn nomojn de objektoj. La homa vivo ne estas la gramofona disko, kiu senerare reproduktas ĉiujn aferojn registritajn.

La nuntempa edukado nur fabrikas la gramofondiskojn. Antaŭ ĉio “ellaboru la homojn.” Kiam maturiĝas la memkonscio de homo, li povas facile digesti en la kapo unu du librojn laŭplaĉe.

Kion la eduko celas, temerare produktante nur diskojn!

Por elfari ion vere valoran, oni devas dediĉi decan penadon malfacilan, t.e. sinhardadon. Nuntempe disvastiĝas la tendenco, akiri grandan rikolton kiel eble facile. Nuntempaj gejunuloj, kiuj facilanime ricevas edukon, duone sin amuzante, en dorloto de gepatra protektado, ne povas proprigi al si ion valoran. Ili fariĝas nur supraĵaj homoj. Sen efektivaj spertoj oni ne povas vere ellerni ion.

Nun la homoj avidas nur akiri sciojn tiel ke rezultas la kapo plena kun animo malplena. Ĉio fariĝas vere aŭtentika nur per hardado, tute egale ĉu objekto, ĉu afero, ĉu homo. Survoje de sinhardado oni foje sentas fari sensecaĵon

aŭ eĉ malprofiton. Sed neniu estas vere aŭtentika, eĉ se li facile atingis la supron sen trapaso de doloroj. Cetere en la realo tio ne eblas okazi.

La edukado de sento estas pli kaj pli neglektata lastatempe. Tio rilatas al la neglekto de hardado. Nuntempaj junuloj ne havas dankosenton pro objektoj, nek pri homoj. Ili simple pensas, ke la akvo per si mem elfluas, la suno brilas laŭ naturo, la gepatroj naskis kaj nutris ilin laŭ sia bontrovo, la rizo, la tritiko ktp. – ĉio produktiĝis laŭnature. Ili ne povas senti dankemon. Tio venis, ĉar ili ne spertis intensan suferon pro manko de objektoj, nek spertis doloran malfacilecon en kreado de io. Ili tuj plendas okaze de ia malfacilaĵo, kaj se la plendo ne estas plenumita ili facile malesperiĝas ĝis fine, volas sin mortigi. Nenion utilas, se oni produktas multe da tiaj homoj.

Rilate la edukadon de inteligenteco, gravas sciigi la ordon, diferencon kaj rilaton inter aferoj. Ekzistas diferenco inter homoj supraj kaj malsupraj, inter objektoj dekstraj kaj maldekstraj; ekzistas ordo ankaŭ en turniĝado de la Naturo. Sen bona scio pri la menciitaj aferoj, homo facile faras stultaĵon kaj ne povas fari bonordan progreson en la vivo. Kvankam lastatempe prosperas la esplorado kaj komparado de la ordo kaj diferenco inter aferoj de la naturo, la ordo inter homoj estas pli kaj pli malrespektata precipe inter la junuloj, kiuj estas venenitaj de la ideologio, kiu apelacias nur la fanatikan egalecon de la homoj. Ju pli prosperas

la edukado, ju pli da lernejoj konstruiĝas, des pli produktiĝas da homoj, kiuj ne komprenas la veron de la universo.

Lerni logikaĵojn aŭ memori malfacilajn vortojn estas afero nur lastvica. La unuavice grava afero estas vere sciigi, kio estas la amo, kio estas la danko, kio estas la homa sincereco, kaj kiajn fortojn povas elmontri ĉi tiuj menciitaj.

Per la nuntempa supraĵa edukado ne elfariĝas vere unuecigitaj personecoj, kun dieca virto, kaj kun sinoferema spirito por la publiko, eĉ se ili kapablas en iu fako.

Unuvorte la plej grava afero estas instrui dankemon kaj por tio necesas la harda edukado, alivorte edukado akompanata de pezaj laboroj.

Homo kortuŝiĝas de amo, sed ne de logiko. Nenio pli eraras ol la edukado, kiu plej respektas la racion.

Ekkoni la gepatrojn kaj poste la familianojn; ekkoni sian hejmon kaj poste najbarajn.

Lerni pri Japanio kaj poste studi pri la mondo—jen estas ordo.

Povas esti necese lerni la anglan lingvon aŭ la germanan laŭ diversaj vidpunktoj. Sed ne pli ol la japanan. Escepte homojn, kiuj deziras akiri anglan naciecon, la japanoj, kiuj restos japanoj dum la tuta vivo, prefere lernu kiel eble plej multe pri aferoj de Japanio.

Rilate la tempon la historio, rilate

la vastecon la geografio—ĉi tiuj du fakoj estas la plej efikaj lecionoj por doni la komunan saĝon kaj altan juĝkapablon.

Ĉar la infanoj ŝatas ion novan kaj freŝan, estas necese doni al ili kiel eble diversajn aferojn novajn kaj freŝajn. Jen estas vera edukado. La socio nur devas kompletigi la instancojn por kontentigi iliajn dezirojn.

La plej bona vartistino estas tia, kia plej malmulte intervenas al infanoj. Ne bona estas tro senbrida lasado, sed multe pli malbona estas intervenado je ĉiu detalo. Tio devas esti sintenado de pliaĝuloj je la gvidado de malpli aĝaj.

“Vi neniam sukcesos!” aŭ “Nenia espero estas kun vi.” Oni neniam devas doni tiajn malesperigajn vortojn. Homo neniel reboniĝas per tia malvarma vortanimo, sed kontraŭe plej ofte li perdas esperon kaj enfalas en degeneriĝon.

Nenio pli kruele venenas la junulojn, ol la dependemo.

Io sentebla pruvos sian ekziston

Ĉio havas sian ombron kaj sonon. Pere de la ombro kaj sono oni povas diveni la ekziston de io kaj ĝian karakteron.

Kvankam homoj ĉiam renkontas multajn ombrojn kaj sonojn kaj tamen ili

ne scias, kio efektive estas la originaloj de l’ombroj kaj sonoj, ĉar ili nur senatente vidas aŭ aŭdas ilin. Se oni rigardas aŭ aŭskultas kun serioza atentemo, montriĝas ke ĉio entenas en si mirindan mistikaĵon.

Antaŭ vere malfermitaj okuloj ĉio estas mirindaĵo por ni. Ĉio kiel de la naturo, tiel ankaŭ de la homa mondo, estas objekto de nia senlima intereso. Eĉ en floreto de sovaĝa herbo en la kampo, eĉ en ŝtoneto kuŝanta sur la monto estas kaŝita nepriskribebla sekreto de la naturo. Ĉio vidata, ĉio aŭdata estas enigmo nesolvebla, ĉu ne? Anstataŭ vane plendadi la malfacilan vivon en la polvokovrita urbo, prefere malfermu la okulojn por rigardi la ĉielon kaj turnu la orelojn por kapti la sonon de la turniĝado de l’tero por tiel pensi pri nia mondo, kiu daŭras de l’ praepoko senlime.

Lernu de aliaj homoj, introspektu vin mem, kaj komprenu kio vere estas la homo.

Dankante la specialan favoron de Dio, alte kaj vaste flugu en la kadro de l’ libereco al vi donita.

Ke homo ekinteresiĝas en io, ke li ekrimarkas ion, ke li aŭdas ion ne atenditan, ĉio ĉi tio estas la manifestiĝo de

siatempa interno lia.

Ĉar la fizika mondo estas la manifestiĝado de signifo de la spirita mondo, neniuj fenomenoj en la fizika mondo estas sensignifaj. Tamen la modernaj homoj nur esploras la fenomenojn materialisme, pensante ke ili estas simple de la natura leĝo de kialo kaj rezulto.

Penso desegnas figuron

Nur en unu tago tre diverse ŝanĝiĝas la temperamento. Estas interese trankvile rigardadi la ŝanĝiĝon de l' temperamento.

La edzo, ricevinte riproĉon de estrarano de l' kompanio, hejmen revenas malbonhumora kaj sovaĝe kondutas al la edzino, kaj ĉi tiu ĵetas akrajn vortojn kontraŭ servistino, kiu siavice kolere forpelas la katon kaj ĝi saltas sur la breton, de kie falas ceramikaĵo kaj rompiĝas. Tio estas turniĝado de l' energio, kiu neniiĝas nur post plenumado de tiom da siaj taskoj.

La ago estas la manifestiĝo de la penso. Do, ĉio videbla en la socio estas la manifestiĝo de la pensoj de la socianoj.

La homoj en la mondo atentigas nur

pri la agoj eksteraj, neglektante la spiriton (penson) tenantan en ili. Ne intencas neglekto, sed ili tute ne rimarkas tion.

Ekzemple imagu: A donas ion al alia, pensante, ke ĉi tiu iam rekompencos lin por la donaco. B, same donacante ion al alia, pensas ke li faras malgraŭvole la donacon, ĉar alie li povos esti malafable traktata. C donacas simple pro kompato. Samaj agoj, sed tre diversaj estas la spiritoj entenantaj.

Responde al la interna regiono de la homoj, konsekvence formiĝas la ekstera regiono. Ĉar la koro de la nuntempaj homoj estas tre hastema, malnobla, kruela kaj malpura, la socio montriĝas tiel sama, kiel la koro.

Nenion utilas kia ajn rimedo nur direktata al la materiaj aferoj, sen atenti pri la movoj de la koroj, kies rezultoj estas ili. Ion materialian oni povas forbruligi aŭ forfluigi, sed sence estas, se restas sama la koro, kiu ĝin naskis.

La spirita mondo estas regiono de pensoj kaj tial ĝi estas senlima en iu senco. Kie oni preĝas, tie naskiĝas Dio; kie oni pensas, tie aperas la vero. Kvankam unuavide la spirita mondo aspektas senlima, en vero ĝi ne estas selima. Ĉiu havas sian spiritan mondon limigitan kaj

krome tre vastan mondon komunan al ĉiuj.

Kio tute ne ekzistas en la spirita mondo, tion oni ne povas pensi. Ĉio, kion homo povas pensi en la fizika mondo, tio nepre ekzistas en lia spirita mondo. La pensoj venas el la spirita mondo. Do, la devo de la homoj en la fizika mondo estas kiel eble multe pensi kaj kiel eble konkretigi la pensojn.

Oni povas krei tiom da spirita mondo, kiom oni pensas. La kadro, kiom hundo povas pensi, estas la mondo de hundo. La kadro, kiom homo povas pensi, estas la mondo, kiu apartenas al la homo. Do ĝin la homo povas libere ekspluati, kulturi kaj kultivi.

Ju pli altan kaj vastan mondon homo havas, des pli supera li estas. La progreso de la homo signifas, ke la mondo, kiun li havas, fariĝas iom post iom pli kaj pli alta, vasta, pura kaj bela. Ni devas peni por tio por eterne kaj senlace.

Ne ĉio, kion ni povas pensi, estas tuj efektivebla en la reala mondo, kvankam ĉio pensebla havas la eblecon iam realiĝi. Pli ĝuste diri, Dio donis la permeson realiĝi. Tial la ekstremo de progreso de la fizika mondo estas la tago, kiam tute perdiĝos la limo inter la du mondoj fizika

kaj spirita.

Ĉar la spirita mondo estas regiono de penso, tiom kiom homo pensas, fariĝas lia proprietaĵo. Se li pensas ĉion identa al si, ĉio fariĝas li mem. Tie naskiĝas la universala amo kaj la regiono universala.

Se homo pensas, ke ĉio estas malamiko, ĉio sendube montriĝas malamiko, kaj tie formiĝas Infero aŭ Buĉejo.

La spiritaĵoj tuj influas al la temperamento, kvankam ne facile percepteblaj per okuloj aŭ oreloj.

Tial, se oni atente observas sian temperamenton, oni povas senti se ne klare, ke li nun estas en ĉielregna atmosfero aŭ ke en li speguliĝas inferaj pensoj.

Multaj homoj serĉas la kialon de temperamenta ŝanĝiĝo simple en videbla ekstera regiono. Sed tio estas tro supraĵa.

Se oni koncentras sian, difinitan personon pri iu persono fronte al lia foto aŭ lia skribaĵo de vortoj, nepre tiu penso komuniĝas al li.

La homa penso komplete forrifuzas nur kiam ĝi estas manifestita en konvena formo.

Pensi estas naski. Ni devas

introspekti pri pensado. Kiam ni pensas malpuraĵon, naskiĝas malpuraĵo. Kiam ni pensas purecon, naskiĝas io pureca. Se ne puriĝas la origino de l' rivero, ne puriĝas la malsupra fluo.

La sekreto de la sindisciplinado estas introspekti pri la pensoj.

Se ne puriĝos la pensoj, neniam venos socio purigita.

Ĉio dolora kaj plezura venas el la spirita mondo

La postulo el la spirita mondo aperas antaŭ ĉio en la "temperamento."

Ĉar la reala mondo moviĝas ĝuste laŭ la spirita mondo, ni klopodu kiel eble unueciĝi kun la spirita mondo kaj ne aŭdacu fari kontraŭnature en ĉiu afero.

Tro da antaŭkalkulo per la korpa saĝo povas venigi neatenditan fuŝon, kiu postlasas doloron longtempe.

Anstataŭ tro multe pripensi per la homeca saĝo, homo faru obeeme tion, kion nature alpuŝas al li la cirkonstancoj. Sed ofte intervenas la inteligenteco kaj

homo facile ofendiĝas kaj falas en fuŝon pro suspektemo kaj kontraŭstaremo.

Jes, tre povas esti okazo, kiam homo sentas la limon de tolereblo. Sed tio venas de erara teniĝo de la koro. Kiel ajn doloran taskon homo povas plenumi relative facile, se li liberigita de la konsidero pri homoj, nur pensas, ke ĝi estas de Dia ordono, kaj donas al ĝi kiel eble plej grandan intereson kaj singifon por sia bono, per granda, spirita vidpunkto.

Bedaŭrinde la modernaj homoj estas tro etanimaj, ofendiĝemaj, sinpostulemaj, venĝemaj kaj ĉiam arogas fari malnaturaĵon, neglektante la leĝon de Providenco.

Povas esti retrodemandebla, ĉu homoj, kiuj vivas feliĉe sur alta nivelo de la socio, efektive havas la kvalifikon esti tia. Tio venas de tro supraĵa vidpunkto. Havi altan pozicion aŭ grandan riĉecon neniel signifas feliĉon (almenaŭ en la nuna mondo). Ĉar la materio estas sub la leĝo de materio, homoj, kiuj dediĉas sian plejblon por ĝin akiri, povas proprigi al si certan kvanton da meterio. Sed ĉu fakte la akirita materio donas eternan feliĉon? Ĉu la pozicio, kaptita per ĉiuj eblaj klopodoj, promesas veran feliĉon? Jes, ili aspektas feliĉaj ekstere. Sed ĉu efektive feliĉaj? La

vera feliĉo ne ĉiam akompanas la aferojn menciitajn.

Vera, eterna feliĉo estas en la koro, kiu apartenas al la spirita mondo kaj tial neniel disponebla per materio. Por homo en drasta malĝojo ne efikas kiel ajn bela pejzaĝo, kiel ajn bongusta manĝaĵo nek kiel ajn sorĉa muziko (kvankam estas vero, ke ĉi tiuj aferoj povas certgrade mildigi la malĝojon.)

Laŭ siatempa korsituacio unu sama afero sentiĝas tre interesa kaj alian fojon tre dankinda. Tiuj ŝanĝoj sendube venas ne de tiu objektiva afero, sed ĉefe de la subjektiva juĝo de la koncerna persono. La subjektivo estas ligita al la spirita mondo kaj influata de la eco de l' animo siatempa.

Kiam homo ekzamenas sian internon kviete, li rimarkas, ke li foje sentas profundan malĝojon pro tute ne konata kialo kaj foje li estas tre gaja kaj agraba, ke li subite akiris viglecon kaj alian fojon ke li tute deprimiĝis. Ĉio ĉi tio ne venas nur de la realmondaj fenomenoj. Vidu, objekte tute sama afero kaŭzas iafoje ĝojon kaj aliffoje malĝojon kaj diversajn gradojn de ĝojo kaj malĝojo laŭ la okazo. Jes, la plejparto venas el la subjektivo.

De kie venas la subjektivo?

Nuntempaj sciencistoj diras, ke ĝi venas de heredo kaj spertoj. Jes, pravas en iu senco. Sed kiel okazas la heredo? Tion oni ne povas solvi nur per esplorado de la fiziologiaj fenomenoj. La problemo pri la origino de la vivo evidente staras antaŭ la muro ne trairebla per la argumento pri la materio. Ĝi solviĝas, nur kiam homoj ekscias la ekziston de la spirita mondo kaj la interrilaton inter la spirita kaj la fizika mondoj.

La koro havas la inklinton elfluiĝi en formon kaj kiam kompletiĝas la formo, ĉi tiu enfluas en la koron. Kaj tiam okazas perfekta unueciĝo de spirito kaj korpo nome la elfariĝo.

Ne kompleta estas la spirito sola, nek nur la korpo. Unuavice la spirito elfluas en la korpon, kaj sekvas la enfluo de la korpo en la koron kaj nur tiam estas la kompletiĝo kaj kontento.

La spirito nepre influas al la korpo kaj la korpo ankaŭ influas al la spirito. Sed la ordo de la vico devas esti rigore respektata.

Laŭ ĉi tiu ordo, la homo aperas en la fizika mondo el la spirita, kaj post plenumado de la misio en la fizika mondo, revenas al la spirita mondo kaj per tio okazas la unua kompletiĝo. Tion oni povas diri ne nur pri la homo, sed

ĝenerale pri ĉiuj estaĵoj.

Homo suferas kontraŭnaturaĵon, ĉar li volas vivi sin bazante nur sur la homa intelekto. Necesa estas la intelekto iafoje, sed oni ĝin elmontru nur en la ĝusta okazo.

Tio, kio ĉiam donas instrukcion pri la vojdirekto, estas siatempa temperamento. La intelekto povas nur juĝi la temperamenton.

La fluo el la spirita mondo aperas en la formo de temperamento.

Ke la fizika mondo estas nur kondukata de la spirita mondo—

Ke ĉio en la fizika mondo estas nur spegulaĵo de la spirita mondo—

Ke tial esence ekzistas nenia koncepto fizikmonda, sed ĉio estas direktata de la spirita mondo—

Pri ĉio ĉi tio homo povas esti konvinkita, se li jesas la fakton ke la individua korpo moviĝas nur laŭ la direktado de la koro, kaj komprenas pri tio ke homo devas suferi intensan suferon kiam li volas rifuzi la ordonon de la koro kaj ke li absolute ne povas rifuzi ĝin.



Nova Tokia Centro